# TEJO-aktuale: numero 144, 2004-07-01

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 144 (1 julio 2004)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>;

---

1. SLAVIK IVANOV ELEKTIĜAS AL LA UEA-KOMITATO!!!
2. VIA KUNLABORO URĜE KAJ TUJ BEZONATA POR LA IJK-GAZETARKAMPANJO!!!
3. LA UNUA HISTORIA NACIA KONGRESO DE NEJO
4. ORATORA KONKURSO DE UEA
5. TA-FERIO

---

1. SLAVIK IVANOV ELEKTIĜAS AL LA UEA-KOMITATO!!!

La voĉdonoj estas jam kalkulitaj kaj montriĝis ke Slavik IVANOV, aktivulo de TEJO kaj E@I, eniros la UEA-Komitaton kiel B-Komitatano (komitatano elektita de la individuaj membroj)! Gratulegon, Slavik! Gratulojn ankaŭ al la kvin aliaj B-Komitatanoj hodiaŭ elektitaj: Istvan ERTL kaj Jukka PIETILAINEN (novaj komitatanoj), kaj  Amri WANDEL, Marije BELOŜEVIĈ kaj LEE Chong-Yeong (re-elektitaj).

---

2. VIA KUNLABORO URĜE KAJ TUJ BEZONATA POR LA IJK-GAZETARKAMPANJO!!!

Partoprenontoj de la 60-a IJK en Kovrov estas nun urĝe petataj viziti la paĝon <http://lingvo.org/xx/4/783>; kaj aŭ preni la pretan version de la gazetarkomuniko en via lingvo, aŭ, se via-lingva versio ankoraŭ ne ekzistas, traduki ĝin en vian lingvon, enmeti viajn datumojn kaj sendi ĝin kun konvena kovroletero al via loka (urba, kvartala, k.a.) ĵurnalo aŭ universitata/lerneja gazeto. Se vi, post kiam vi vizitos la paĝon, ankoraŭ havas specifajn demandoj, vi povas kontakti Marko LINS (Brusela Komunikad-Centro) <marko.lins@lingvo.org>. Ni ĉiuj kunlaboru por ke la ĉi-jara IJK estu sukcesega ankaŭ laŭ publik-informado!

---

3. LA UNUA HISTORIA NACIA KONGRESO DE NEJO

La Nepala Esperanto-Junulara Organizo okazigis sian unuan nacian kongreson en Kathmanduo la 26-an de junio. Partoprenis proksimume 75. La ĉefa gasto estis Prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio, S-ro Mukunda Raj PATHIK. En la dua parto de la programo okazis la elekto de nova komitato. 48 gejunuloj partoprenis en dua parto ĉar oni devis esti malpli ol 30-jaraĝa por esti kandidato kaj elekti siajn deziratajn reprezentantojn. Ĉiuj membroj promesis pli aktive labori por la venonta Azia Kongreso okazonta en Nepalo en 2005.

---

4. ORATORA KONKURSO DE UEA

En la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino denove okazos Oratora Konkurso por la junularo. Rajtas partopreni nur gejunuloj ĝis 30-jaraj, kiuj aliĝis al la kongreso (kandidatoj devas skribe anonci sin al estrarano Humphrey TONKIN almenaŭ unu tagon antaŭ la konkurso). La ĉi-jaraj temoj estas: (a) Lingva egaleco en internaciaj rilatoj,(b) Libera senpaga kopiado de muziko: Kion fari? (c) Kial lerni Esperanton? Premio: tre valoraj libroj

kaj la gajnintoj estos anoncitaj en oficialaj UK-kunsidoj kaj en la revuo "Esperanto". <www.uea.org

---

5. TA-FERIO

Dum la cetero de julio, bv. ne atendi la alvenon de TA, ĉar la redaktoro estos en Rusio--por la IJK! Do, atendu la reaperon de TA post ĉ. monato. Kaj, se vi partoprenos la IJK-on en Kovrov, mi vidos VIN tie!!

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>;.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>;.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>;
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS, Joel AMIS.
Tiun ĉi numeron redaktis Joel AMIS.